

AMERIKA ESPERANTISTO

Entered as second class matter June 28, 1907, at the post office at Chicago Illinois

Monata Revuo de la Lingvo Internacia, Esperanto
Monthly Magazine of the International Language, Esperanto
1239 Michigan Avenue, Chicago

Jarabono, Ie en la Mondo, Unu Dolaro (Spesmiloj 2.05)
Yearly Subscription, Anywhere on Earth, One Dollar

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO, ELDONANTOJ
AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, PUBLISHERS

Redaktoro : ARTHUR BAKER : Editor

Ĉiu manuskripto estas, se tiel petate, nepre resendata al la sendinto. La redakcio rifuzas nenion sekve de ĝia temo, aŭ politika aŭ alia; kaj senescepte retenas al si la rajton korekti manuskriptojn. Sendu verkon.

VOLUMO 2

DECEMBER, 1907

NUMERO 5

Unu kunlaboranto en la kampo esperantisma diras, citante nome la kvalitojn postulatajn en bona instruisto de Esperanto, ke lerteco en la reklama arto ne ĉiam pruvas la kapablecon por instruadi. Konsentite. Sed la reklamisto faras la pli gravan taskon. Iu povas mangigi birdidon. Ĝia tuta korpo konsistas el bušo, ĝia tuta animo estas unu senfunda mangemego. Tiel, se ia homa turtido jam volas engluti en si Esperanton, kaj por tiu celo large malfermas la bušegon, okulojn kaj orelojn, kiom da lerteco necesas por enuti en li dekseson da simplaj reguloj? Tute alie la tasko de la propagandisto! Al li ne sin prezentas ia buša kaverno. Li devas fabriki al si argumentan borilon kaj pene trabori la kranion de la instruoto. Ies kapo povas enteni dekses regulojn, sed ne ĉies cerbujo havas spacon por tiel larga ideo kiel tiu, kiu sin trovas en la esperantismo. Kaj kiam la propagandisto apartigas la emulojn el la malemuloj, kaj prezentas ilin pretaj al la instruisto, tiu lasta ne fieru pro tio, ke ili ensorbas de li per oreloj tion, kion ili povus el libro kaj kun tuta facileco ensorbi per la okuloj! Donu al mi nur unu viglan roton da propagandistoj—marsantaj reklamistoj—kaj mi venkos pli multe da bariloj, ol vi, kun tutaj batalionoj da geprofesoroj.

PERIODA BONVOLO

Kun plena sagaco agis la glora leĝdonanto de Izraelo, dekretante, ke en ĉiu sepa tago la Izraelidoj devas forlasi la mondajn zorgojn kaj laborojn kaj sin okupi per preĝo al, kaj pensado pri, la nacia dio. Estas tute notinde, ke en tiuj religiaj sektoj, kiuj pleje prizorgas kaj pie honoras grandegan nombron da sanktaj tagoj, festaj tagoj kaj fastaj tagoj, en tiuj sektoj la kredo plej forte tenas la popolan koron. De la judaismo ni ricevis tiun laŭdindan kutimon pri la sepa tago; sed al la kristanismo ni ankaŭ faras ŝuldon de dankemo, ricevante de ĝi la ĉiujaran feston de "paco kaj bonvolo inter la homoj."

Sed oni ne povas prave diri ke la kristnaska festo estas unutaga afero. Efektive, ĝi komencas ĉirkaŭ la unua de Decembro kaj daŭras ĝis la komenco de Januaro, kiel konstante plialtiĝanta tajdo de interhoma bonvolo kaj amo, atingante sian plej altan punkton je la dudek-kvina de Decembro. De tiam, ĝi rapide elfluas ĝis la unua de Januaro; tiam, farante unu finan gajan plaŭdon, ĝi afable forlasas la homaron al ĝia dekunu-monata okupo de intermarĉandado kaj reciproka rabado kaj mortigado.

"Gajan Kristnaskon!" krias la bienulo al sia lunto, kiun, per helpo de kristana leĝaro kaj juĝisto li, la duan de Januaro, jetos senkompare sur la neĝplenan straton. "Gajan kristnaskotagon!" respondas la alia, kiu, tamen, tute ne intencas pagi por la akvotuboj krevintaj en la kelo. "Gajan kristnaskon!" krias la panisto, kies bulko mankas en pezo. "Gajan kristnaskon!" kore salutas la laktovendisto, jus melkinte la pumpilon.

Sed oni ne povas kulpigi la Nazaretanon, ke unu aro de homaj lupoj festas ĉiujare lian nomon. Cetere, ĉi momenta ĉeso de la malpaco superas eternan bat-aladon. Estu nia nuna perioda kaj duone hipokrita esprimado de interhoma bonvolo nur la heroldo de la venonta temo iama, kiam bonvolo tenos plenan kaj tutjaran regadon.

LA KUNVENO

Rakonto de Turgenev, el ruse esperantigis R. H. Geoghegan.

Mi sidis en arbaro betula aŭtune, apud la mezo de Septembro. Mem de la mateno falis delikata pluveto, alternanta laŭ temperoj kun varmaj sunaj radiadoj; estis vetero ŝangema. La ĉielo jen tute sin kovris de malpezaj blankaj nubo, jen tuj lokere heligis momente kaj tiam, el post la nubo formovintaj, sin montris la lazuro, klara kaj gracia, kiel bela okulo.

Mi sidis kaj rigardis ĉirkaŭen, kaj mi aŭskultis. La folioj apenaŭ bruetis super mia kapo; sole de bruado ilia oni povis rekoni kia tiam apudestis sezono. Tiu estis ne la gaja ridanta tremado de la printempo; ne la dolĉa mallaŭta paroletado, ne la longa interkomunikigado de la somero; ne la timema kaj malvarma balbutado de la aŭtuno antaŭen-marshinta; sed preskaŭ neaŭdebla kaj dormema babilado. Malforta venteto apenaŭ sin sentigis super la pintoj.

La interno de la arbaro, ŝvitanta de pluvo, ŝangiĝis sen-ĉese laŭ tio, ĉu brilis la suno aŭ ĉu ĝi sin kaſis de nubo. Kelkafoje ĝi lumiĝis tute, kiel se tuj en ĝi ĉio ridetas; la trunkoj maldikaltaj de la ne tre densaj betuloj subite alprenis la kareseman rebrilon de blanka silko; la kuſantaj sur la tero etaj folioj ekdisstrekiĝis kaj ekflamiĝis de oro pura. La belaj trunketoj de la altaj densaj filikoj, jam tinkturitaj de sia aŭtuna koloro, simila al la koloro de vinbero tro matura, tiel ankaŭ ŝajnis senfine sin intermixantaj kaj krucantaj antaŭ la okuloj.

Kelkafoje ankoraŭ tuj ĉio ĉirkaue iomete bluiĝis; la vivaj koloroj momente sin estingis; la betuloj fariĝis ĉiuj blankaj, sen helo, blankaj kiel ĵus falinta neĝo, al kiu ankoraŭ ne tuſis la malvarma ludanta radio de vintra suno; kaj ŝteliste, ekruzete, komencis guteti kaj murmuri tra la arbaro delikateta pluvo. La foliaro sur la betuloj estis ankoraŭ preskaŭ tute verda, kvankam ĝi videble paligis; apenaŭ tie-ĉi tie sin levis sola iu tre juna tute ruĝa aŭ tute ora betulo, kaj oni devis rimarkigi sin al tio, kiel hele ĝi flamiĝis sub la suno, kiam liaj radioj subite tagigis, glitante kaj trembrilante tra la densa retaĵo de maldikaj branĉetoj ĵus ŝprucitaj de la pluvo brileganta. Ne unu birdo estis

aŭdebla; ĉiuj sin kaſis kaj silentis; sole de fojo al alia resonis, kiel ŝtala sonorilo, la mokanta voĉeto de paruo.

Antaŭ ol halti en tiu ĉi betula arbareto, mi kun mia hundo pasis tra granda arbaro tremola. Mi, mi konfesas, ne tro amas tiun arbon—la tremolon—kun ĝia pala siring-viola trunko kaj ĝia grize verda metala foliaĵo, kiun ĝi levas kiel eble pli alte kaj, kiel ondanta ventumilo, etendas en la aeron; ne amas mi la eternan balancadon de ĝiaj rondaj malpuraj folioj, mallerte alligitaj al longaj vostetoj. Ĝi estas bona nur en iaj someraj vesperoj kiam, sin levanta izole intermeze de malgranda arbetaro, ĝi sin prezentas al la ruĝigantaj radioj de la suno kuſanta kaj tremas de la radikoj ĝis la pinto, dronata en ora purpuraĵo; aŭ kiam, en klara venta tago, ĝi tute brue ondas kaj balbutas en la bluan ĉielon, kaj ĉiu folio ĝia, kaptita de la venteto, kvazaŭ volas sin disigi, forflugi kaj forkuri malproksimen. Sed ordinare mi ne amas tiun arbon, kaj pro tio, ne haltinte en la arbaro tremola por ripozi, mi atingis la betulan arbaretton, min eligis sub arbo, kies branĉoj komencis de malalte super la tero, kaj sekve povis min ŝirmi de la pluvo kaj, ekadmirinte la ĉirkaŭan vidon, ekdormis laŭ tiu trankvila kaj dolĉa dormo, kiu estas konata sole de la ĉasistoj.

Mi ne povas diri kiom da tempo mi dormadis sed, kiam mi malfermis la okulojn, la tuta interno de la arbaro estis plenigita de la suno kaj en ĉiujn direktojn tra la ĝoje bruanta foliaĵo penetris kaj kvazaŭ briliantis la klara blua ĉielo; la nuboj sin kaſis, pelitaj de la leviĝinta vento; la vetero repurigis, kaj la aero sentigis tiun apartan kaj sekan freſecon, kiu, pleniginta la koron de ia kuraĝa sento, preskaŭ ĉiam antaŭsignas pacan kaj klaran vesperon post tago pluvada.

Mi min iomete pretis por stari kaj por denove tenti la sorton, kiam tuj okuloj miaj haltis sur nemovema homa formo. Mi rigardadis; tio estis junia kamparana fraŭlino. Si sidis po dudek paſoj de mi, penseme mallevante la kapon, kaj faligante ambaŭ manojn sur la genuojn; en unu el ili, laŭmeze malfermata, kuſis densa bukedo de kampaj floroj kaj je ĉiu ŝia enspirado trankvile glitis sur la karoita jupo. Pura blanka ĉemizeto, butonumita ĉe la kolo kaj la manradikoj, falis laŭ mallongaj graciaj faldoj ĉirkaŭ ŝia talio; grandaj flavaj perloj en du vicoj malsuprenkuris de la kolo ĝis la brusto. Si estis ja tre beleta. Densaj blondaj

harligoj, de ĉarma cindra nuanco, sin dividis laŭ du zorgeme kombitaj duonrondoj el sub rekta rozkolora rubando, bindita preskaŭ sur mem la frunto, blanka kiel elefanta dento; la restanta parto de ŝia vizaĝo apenaŭ roziĝis de tiu ora sunbrulo, kiun alprenas sole delikata haŭto. Mi ne povis vidi ŝiajn okulojn—ſi ilin ne levis; sed mi klare vidis ŝiajn delikatajn arkitajn brovojn, ŝiajn longajn okulharojn; ili estis malsekaj kaj, sur unu el ŝiaj vangoj, brilis sub la suno sekita postsigno de larmo, sin haltiginte ĉe mem la lipoj, iomete paligintaj. Tuta ŝia kapeto estis tre aminda; eĉ la iomete dika kaj rondeta nazo ŝin ne nebonigis.

Al mi aparte plaĉis la esprimo de ŝia vizaĝo, tiel malgaja kaj tiel plena de infana nedecidemo antaŭ ŝia propra ĉagreno. Ŝi videble atendis iun ajn; en la arbaro io mallaŭte krakis; Ŝi tuj levis la kapon kaj malantaŭen rigardis; en la diafana ombro, rapide brilis antaŭ mi ŝiaj okuloj, grandaj, helaj, kaj timemaj, kiel de cervino. Nemultajn momentojn aŭskultis Ŝi, ne deturnante la larĝe malfermajn okulojn de la loko, kie resonas la malforta sono; Ŝi sopiris, turnis malrapide la kapon, ankoraŭ pli malalten sin klinis kaj komencis malrapide dispecigi la florojn. Palpebroj Ŝiaj ruĝiĝis, ploreme kurbiĝis la lipoj, kaj nova larmo rulis el sub la densaj okulharoj, haltigante sin kaj radieme brillante sur la vango. Tiel pasis sufice multe da tempo; la mizera knabino sin ne movis; sole de fojo al alia maltrankvile Ŝi svingetis la brakojn kaj aŭskultis, ĉiam aŭskultis.

Denove io ekbruis en la arbaro,—ſi ektremis. La bruon ĉesis, ĝi fariĝis malkonfuza, alproksimiĝis; sin aŭdigis fine firmaj rapidaj paſoj. Ŝi sin relevis kaj kvazaŭ tremis de timo; ŝia atendema rigardo komencis balanci, sin flamigi de atendemego. Tra la arbadenso bruske ekſajnis figuro de viro. Ŝi ekrigardegis, ruĝiĝis tuj, ĝoje kaj gaje ridetis, preskaŭ sin levis kaj, tuj ree malaltigis la kapon tute, paligis, konfuziĝis kaj, nur tiam levis trememan, preskaŭ petegan rigardon sur la venintan homon, kiam tiu ĉi sin haltigis flanke kun Ŝi.

Mi kun scivolo rigardis lin el mia kaſejo. Mi konfesas, li ne faris al mi favoran impreson. Li estis, laŭ ĉiuj aperoj, dorlotita ĉambristo de junia, riĉa sinjoro. Lia vestaĵo elmontris pretendon al la gusto kaj afektulan preterlasemon; sur li estis mallonga plato de bronza koloro, ŝajnevide de

la ŝultroj de la mastro; ligtuberita supre, roza kravato kun lilakaj ekstremaĵoj; kaj ĉapelo de nigra veluro kun oraj galonoj, malsupren puſita ĝis mem la brovoj. La ronda kolumo de lia blanka ĉemizo senbedaŭre apogis al li la orelojn kaj tranĉis la vangojn, kaj rigide amelitaj manumoj kovris la tutan manon eĉ ĝis la ruĝaj kaj hokitaj fingroj, ornamitaj de arĝentaj kaj oraj ringoj kun miozotoj el turkizo. Lia figuro, ruĝema, kruda, senhonta, apartenis al la nombro de figuroj kiuj, tiel multe kiel mi povis konstati, preskaŭ ĉiam naŭzas la virojn kaj, domaĝege, tre ofte plaĉas al la virinoj. Li videble penadis doni al siaj maledelikataj trajtoj esprimon malsatan kaj enuitan. Senĉese li palpebrumis siajn lakte-grizajn kaj krom tio malgrandetajn okulojn, sulkigis la frunton, mallevis la angulojn de la lipoj, oscedis laŭ ŝajno deviga kaj laŭ senzorga kvankam neniel lerta senĝeno, jen realĝustigis per la mano la karotkolorajn arte torditajn tempibuklojn, jen pinĉetis la flavajn haretojn, videblajn sur la dika supra lipo—unuvorte, li pavis sin netolereme. Komencis li sin pavi de tiam, kiam li ekvidis la junan kamparaninon lin atentantan; malrapide, laŭ dekliniĝantaj paſoj, alproksimiĝis li al ŝi, haltis, levis la ŝultrojn, ingis ambaŭ manojn en la poſojn de la palto kaj, apenaŭ honorante la mizeran filinon de rapida kaj indiferenta rigardeto, sidiĝis sur la teron.

“Nu!” komencis li, daŭrante rigardi ien ajn flanken, skuante la piedon kaj oscedante: “longe ci estas tie ĉi?”

La juna knabino ne povis tuj al li respondi.

“Longe. . . . , Viktor Aleksandroviĉ,” diris ŝi, fine, apenaŭ laŭ voĉo aŭdebla.

“Ha!” Li formetis la ĉapeton, majeste pasigis la manon en la densajn kaj forte frizitajn harojn kiuj komencis preskaŭ ĉe mem la brovoj kaj, laŭ altega maniero, rigardinte ĉirkaŭen, singardeme kovris ree sian multvaloran kapon. “Kaj mi estis preskaŭ tute ĝin forgesinta. Plie, vidu do, la pluvetado!” Li oscedis. “Taskoj senfunde; tute ne povas oni uzi la juĝon, kaj li (la sinjoro) ankoraŭ riproĉas. Ni apartiĝos morgaŭ. . . . ”

“Morgaŭ?” elparolis la juna knabino kaj direktis sur lin timigitan rigardon.

“Morgaŭ. . . . nu, nu, nu. Havu la bonecon—,” respondis li rapide kaj kolerete vidante ke ŝi ektremis trae

kaj dolĉe klinis la kapon; "havu bonecon, Akulina, ne plori. Ci scias, mi tion toleri ne povas," kaj li sulkigis sian platan nazon, "se ne, mi tuj foriros. . . . Kia malspriteco, plorete!"

"Nu, mi ne faros, mi ne faros" rapidege elvoĉis Akulina, kun peno glutante la larmojn. "Ankaŭ vi morgaŭ foriros?" aldonis ŝi post malgranda silentado; "kiam do Dio permesos al ni ree kunvidi kun vi, Viktor Aleksandroviĉ?"

"Oni sin revidos, oni sin revidos. Ne en la estonta jaro —iom poste. La sinjoro, ŝajnas, en Peterburgo en funkciojn eniri deziras," aldonis li, elparolante la vortojn laŭ apatio kaj iom en la nazo; "kaj povas esti ankaŭ translimen ni vojaĝos."

"Vi min forgesos, Viktor Aleksandroviĉ"—malgaje diris Akulina.

"Ne, kial do? Mi cin ne forgesos; nur ci estu senchava, ne faru naivege; obeu al la patro. . . . Kaj mi cin ne forgesos—ne-e." Kaj li trankvile sin forstreĉis kaj ree oscedis.

"Ne forgesu min, Viktor Aleksandroviĉ," daŭrigis ŝi laŭ petegema voĉo. "Jam ŝajnas, mi tamen vin amis; ĉio, ŝajnas, por vi. . . . Vi diris, al la patro mi devas obei, Viktor Aleksandroviĉ. . . . Sed kiel do mi al la patro obei. . . ."

"Kaj kial?" Li elparolis tiujn ĉi vortojn kiele el la ventro, kuſante sur la dorso kaj submetinte la manojn sub la kapo.

"Sed kiel do, Viktor Aleksandroviĉ, vi mem scias. . . ."

Si silentis. Viktor ludis kun la ŝtala ĉeneto de sia horloĝo.

"Ci, Akulina, ci estas knabino ne malsaga—" ekparolis li fine; "pro tio, ridindaĵojn ne diru. Mi al ci bonon deziras, komprenas ci min? Fine, ci ne estas malsaga, ne entute kamparanino, tiel diri; kaj cia patrino ankaŭ ne ĉiam kamparanino estis; sed ĉiam ci estas sen instruo—sekve, devas obei, kiam al ci estas parolante."

"Sed terure, Viktor Aleksandroviĉ!"

"Ho, kia ridindaĵo, mia kara; en kio trovas ci terurajon? Kio estas tio apud ci?" aldonis li pliproksimigante sin al ŝi: "floroj?"

"Floroj," respondis Akulina malgaje. "Tio, mi sov-

agajn sorpojn kolektis—” almetis ŝi, iomete reviviĝanta. “tio por bovidoj estas bona. Kaj tio, jen kalendolo, kontraŭ skrofuloj. Jen, rigardu do, kia neordinara floreto; tian neordinaran floreton mi ankoraŭ dum la vivo ne vidis. Jen miozoto, kaj jen violo. . . . Kaj jen tio mi por vi”—aldiris ŝi, fortirante el sub la flavaj sorpoj malgrandan bukedenon de ĉielbluaj cejanoj, kunligitaj per maldiketa herbo; “Ĉu vi ĝin volas?”

(Daŭrigote)

DU OVOJ FRITITAJ

Amerikano eniris en restoracion, sidiĝis apud tablo, legis la mangokarton kaj diris: “Kelnero, alportu al mi du ovojn, unu ovon fritita je la unu flanko, kaj la alian ovon fritita je la alia flanko.”

Malaperis la kelnero. Post du minutoj li revenis kaj diris: “Pardonu, sinjoro, kio estas via ordono?”

“Mi diris,” malpacience, “ke mi deziras du ovojn, la unu ovon fritita je la unu flanko kaj la alian ovon fritita je alia flanko.”

Remalaperis la kelnero. Post du minutoj reaperis la kelnero nerva kaj ekcitita.

“Mi petas pardonon, sinjoro, sed mi opinias, ke mi ne kompreuas vian ordonon. Ĉu vi volas, mi petas, ripeti la saman?”

Malrapide kaj akcentege la kliento diris, “Aŭdu, mal-spritulo! Mi deziras ke vi alportu al mi du ovojn, unu ovon fritita je la unu flanko kaj la alian je la alia flanko.”

Ree malaperis la kelnero. Pasis minuto—du—trikvin—dek; fine aperis kelnero, la hararo malordigita, la vangoj gratitaj, la vestoj dissiritaj. Parolis kelnero, malgoje: “Sinjoro, mi petas ke vi mangu ovojn bolitajn—la kuiristino kaj mi havis iomete da malkompreniĝo.”

—W. H. Fox.

Vizitanto (ĉe la lagbordo). “Kion vi faras dum la tuta somero?”

Loganto. “Ni fiŝkaptas kaj mallaboras.”

“Kaj kion vi faras dum la vintro?”

“Ni ne fiŝkaptas.”

POLA ANTOLOGIO

Ĉi tiu bonega verko de Kabe, enhavanta tradukaĵojn el dek kvar polaj verkistoj, meritas konsideradon de ĉiu nepola esperantisto. Krom la fama boneco de la Kabe'a tradukado, kaj la dezirinda koniĝo kun novaj verkistoj, kaj la interesoj de la noveletoj mem, oni gajnas ankaŭ, per legado de tiu ĉi libro, bonan vidon en la polan karakteron.

Kiel popolo, tiel la literaturo. Legante ĉi tiujn diversajn rakontojn, la amerikano sentas ekkonon kun sia pola frato, ekscion de liaj trajtoj, pensoj, esperoj, idealoj, celoj, k.t.p. ; kaj li trovas lin ne tute malsama de si mem. Noveletoj pri la amo al la virino, kaj al la patrujo ; rakontoj pri la sapiro al idealoj ; humoraĵoj ; antikvaj legendoj ; kaj al- egorioj kun temoj per pensado,—ĉiuj montras ke la koroj de poloj kaj amerikanoj batetas agorde.

En unu okazo, tamen, ŝajnas al mi ke la pola literaturo faras gravan kontraston kompare kun la angla. La tiu estas farita, kiel diras Cart en la antaŭparolo de Pola Antologio, "el plej akuta—kvazaŭ angla—observado, malakrigita de ia konfusa, laca, nur orienta rezignacio." La ĉi tiu estas farita el ne malpli akuta observado, sed, anstataŭ malakrigita, ĝi estas pliakrigita de klara, moviga, vere okcidenta agemeco, kiu ne kontentigas ke la heroo kuſiĝu kun siaj revoj, sed antauenpuſas lin al la realigo de la deziroj.

Niaj rakontoj pri bataletoj inter la pioniroj kaj "ruĝ- haŭtuloj," kaj la aventuraj kaj historiaj noveloj, fantaziaj aŭ alie, kiuj plaĉas al la amerikano, junia kaj maljuna, ne kontentigas lin esceptinte ke la heroo venkos ĉiujn kontraŭ- ajojn, kaj fine triumfos. Estas konata ŝerco ĉe ni, ke ĉia amfabelo finiĝas per "Kaj ili geedziĝis, kaj ĉiam poste loĝis kune tre feliĉaj." Unuvorte, la literaturo kiu estas bon- vena al amerikano traktas la homan penadon kondukantan al sukcesa finigo.

Ekzemple, se amerikano verkus por amerikanaj legontoj ian "Srul el Lubartov," tia ne finiĝos per la plorego de la hebreo sur la bordo de la Lena, sed Srul sendube estos tri- umfe rekondukita en Polujon, eĉ se la verkisto devigus krei, rakonte, grandan tutmondan militadon !

Ĉi tiu diferenco de la du literaturoj devenas, kredeble,

el la diferenco de la karakteroj en la du rasoj. La polo, kun sia amo al meditado, siaj revoj al idealo vivo, siaj esperoj pri estonta orepoko; kaj la amerikano kun sia agemeco, sia fervora antaŭenpušado ĝis la finigo, sia amo al la penado pro ĝi mem;—ĉiu havas sian propran viv-niĉon por plenigi, kaj la mondo bezonas la ambaŭ.

L. F. N.

LA BABILEMULO

La babilemulo, ordinare, estas nek vanta nek malhumila, sed li bezonas paroli, paroli, kvazaŭ estus necese, ke li movu la langon. Li estas “infano terura” en la kunvenoj, kaj fariĝas teda kaj netolerebla.

Sinjorino de la Ferandiere, merita fablistino, malpli konata, tamen, ol sinjoro de Lafontaine, priskribis kaj mokis la posedanton de tiu malbonaĵo, per versaĝa fablo, kiun multaj gepatroj lernigas parkere al siaj infanoj. Jen la traduko de tiu beleta fablo:

La Pigo kaj la Hirundo

“He ! Bonan tagon, karulino!” diris la babilema Pigo al Hirundo, kiam la printempo revenis. “Sajnas al mi, ke vi sanas, mia kara, ankau via edzo kaj viaj beletaj idoj. Vi estas ĉiuj feliĉaj, vi, geedzoj, bone konsentas, tamen tio estas malofta nune. Rakontu do al mi, kiajn kuriozaĵojn vi vidas, kiajn danĝerojn vi renkontis, dum viaj malproximaj vojaĝoj. En niaj arbaroj, neniaj sciigoj. La kriemaj garoloj ĉiam malpacas. La avidaj paseroj ruinigas herbejojn kaj kampojn. La Silvioj, ĉe ni, estas ĉiam nefidelaj al siaj edzoj, eĉ al siaj amantoj.

“Ne malproksime de la kverko en kiu mi restadas, apud la dometo ruinigita, en kiu vi jam loĝis, du karesemaj amemuloj loĝas ne longe. Ili estas, vere, bonaj najbaroj, sed malgojaj birdoj. La turto estas dolĉa kaj bela, sed, mi aldonas tion mallaŭte, neniu estas pli malsprita. Ĝi restadas kun mi, la tutan posttagmezon, ne malferminte la bekon, dirinte eĉ unu vorton. Mi kredas, ke ĝi pasas la tutan jaron, ne parolinte unu fojon. Ĉu vi, dum via vivo, estas koninta inon pli netolereblan?” “Ho jes,” ekrespondis la hirundo, “la inon, kiu senĉese parolas.”

—Tradukis A. Boitard, Pierre (Saone et Loire), France

LA TRI SUNOJ

El germana originalo de Chamisso, tradukis Otto Haux Mayer

*Ne ĉiam la bukloj argente
Sur miajn tempiojn fluadis;
Mi ankaŭ, ho dolĉa knabino,
Junulo iam estadis.*

*Kaj dum mi vin gajan ekvidas,
Florantan en roza koloro,
Jam malaperintajn estaĵojn
Revekas la sorĉa memoro.*

*De l' via patrin' la patrino,
Plej luma ŝi estis, plej bela !
Mi time la vidon eklevis,
Kiel antaŭ la suno ĉiela.*

*Mi manon ŝian premetis,
Sentante min feliĉega ;
Kaj jen ŝi akceptis alian,—
Mi fremden eliris solega.*

*Vaginto mi hejmen revenis,
Lacega, en tempo malfrua ;
Jen sur la patruja ĉielo
Leviĝis jam suno la dua.*

*Jes, via patrin', ho knabino !
Plej luma ŝi estis, plej bela—
Mi time la vidon eklevis,
Kiel antaŭ la suno ĉiela.*

*Mi frunton ŝian kisetis,
Sentante strangan tremegon;
Kaj jen ŝi akceptis alian,—
Mi vagis trans la maregon.*

*Nun hejmen, fleksita de l' jarcoj,
Migrulo melankolia,
Post viv' trarevita mi venas ;
Jen brilas suno la tria.*

*Vi estas ĝi, rava virino,
Plej luma vi estas, plej bela !
Mi time la vidon eklevas,
Kiel antaŭ la suno ĉiela.*

*Vi al mi kompate permesas,
La lipojn tuſi kisete,
Kaj viron alian akceptas;
Mi baldaŭ dormados kvieta.*

POR LA RIDETO

Tradukis el diversaj amerikaj gazetoj Sino. Martha A. Boughton.

Johanĉjo estis bona knabo, sed li amis batali. Lia patrino ofte estis riproĉinta lin, kaj fine li promesis neniam ree batali. Tiun saman nokton, li venis de la lernejo, kun nigrigitaj okuloj, kaj sen unu dento.

“Johanĉjo,” diris lia patrino, “vi promesis al mi, matene, ke vi neniam batalus.” “Sed mi ne batalis, patrino. Tiu ĉi estas okazo.”

“Okazo !”

“Jes, patrino. Mi estis sidanta sur la dorso de Ernesto, kaj mi forgesis teni liajn piedojn !”

La aminda Feino alvokis al si sian helpistinon, kaj montris al ŝi oran skatolon. “Prenu tiun ĉi skatolon” ŝi diris, “kaj ŝlosu ĝin en la kesto. Ĝi enhavas bonan konsilon.”

“Mia kara sinjorino” respondis la helpistino, “kial ŝlosi nian bonan konsilon ? Neniu iam ajn ĝin prenus !”

Unu membro de la Klubo por la Sano kiu ofte faris paroladojn pri la pureco en la malaltaj lokoj de Nov-Jorko, diris, ke unufoje ŝi estis parolinta pri la graveco de uzo de la dentbroso. Post kelke da tagoj, malriĉulino, kiu subtenis mallaboreman edzon, kaj kvin infanojn, renkontis la parolantan.

“Jen, mi havis tion ĉi por ni, Sinjorino” ŝi diris. “Nun ni uzos ĝin ĉiutage.”

“Havas kion ?” demandis la sinjorino, konfuze.

“Dentbroson, kiel vi diris,” estis la respondo. “La infanoj, kaj mi, kaj mia edzo uzas ĝin ĉiutage.”

(Daŭrigata de la dua)

erations,—a position which was eagerly looked forward to from the very beginning of the Association's existence. Meanwhile the Association is completely controlled by its members and the Council to be elected by them.

Trusting in your courtesy and fair-mindedness to print this somewhat lengthy reply to the rather savage attack on the Association, I remain yours truly,

J. F. Twombley,

Sec'y American Esperanto Association.

Brookline, Mass., Nov. 7, 1907.

Postscript.—I heartily commend the last paragraph of your article. It is just what the Journal is contending for: see the October, November, and December numbers.

EDITOR'S NOTE.—The foregoing letter refers to a discussion of the American Esperanto Association, in which (see October number) this magazine took the position that the present organization is provisional in fact, though ostensibly permanent. If any of the statements made were inaccurate, we cheerfully waive all demand for their consideration, as the real issue was summarized in the last paragraph, *which our correspondent approves*. It seems, therefore, that by a circuitous arithmetical route I have reached a certain spot, and find Sro. Twombley has "beat me to it" by an algebraic cut across-lots. We are agreed that a pair of twos makes a four. Are there any objections? If not, kindly remove this folio from this copy of *Esperantisto*, tear out the four pages from the October copy, and forget it.

LERNEJO DE ESPERANTO

La konstanta progreso de Esperanto ĉiam altiris novajn propagandantojn, kaj la novaj propagandantoj konstante pligrandigas la antaŭenpüşon de la afero. Inter la novaj firmoj esperantistaj estas la *American School of Esperanto*, ĉe Rockford, Illinois, U.S.A. Tiu estas la enkorpigita ideo de la junaj esperantistoj, Sroj. Hardin kaj Reed. Sro. Floyd B. Hardin (oni devas diri "Rev.") estas la universitatan kiu tiel forte klopojis por Esperanto en la Universitato de Ĉikago en la jaro pasinta. Antaŭ kelkaj monatoj li ricevis diplomon de la Brita Esperantista Asocio, kaj kvankam li nun estas pastro de unu kredantaro en Wisconsin, li restas tute entuziama esperantisto. Sro. E. C. Reed, antaŭe el Bostono, sed nun loĝanto de Rockford, estas ankaŭ diplomito de la B.E.A., sekretario de la Ilinioja Federacio Esperantista, kaj forte penadas fortikigi la tenon de la esperantismo ĉe la popola koro. La *American School of Esperanto* poste donas instruadon pri la lingvo.

THE CHICAGO ESPERANTO SOCIETY

OFFICERS: *President*, Walter Howard Fox, M. D., D. D. S., 92 State Street. *Vice-President*, A. G. Beaman, Santa Fe Offices, Railway Exchange Building. *Secretary*, J. Howard Pearson, 551 South Waller Avenue. *Treasurer*, F. E. Roberts, 556 42nd Avenue.

REGULATIONS: Membership fee, \$1.00. This includes a year's subscription to *Amerika Esperantisto*. To subscribers of this journal the membership fee is waived. Dues, \$2.00 per year.

In the teaching of Esperanto, the British Esperanto Association requires that all instructors be *diplomitoj*; that is, that anybody who desires to teach must be examined by the examination board of one of the national associations, receiving a diploma and permission to teach. Usually the most thorough Esperantist should teach the beginners, so that they may commence the study correctly. The instruction in the Chicago Esperanto Society is by the "rational" method used in the European Societies, and thus the study is interesting, as well as instructive. The efficiency of the instruction department constantly increases, and in the classes there is a growing number of enthusiasts who are certain to become teachers and leaders in our movement. It is the earnest desire of the Society that many Esperantists may unite with us to increase the number of teachers, and thus spread Esperanto through the world. Come and attend the next meeting and be convinced that the cause deserves your help.

—W. H. F.

The February number of *Amerika Esperantisto* will be a Propaganda number. It will be the best number yet. We want to circulate at least twenty thousand copies, but as the postal laws permit us to print a number of samples not exceeding the number of SOLD copies, we want you to BUY a big bundle of extras. Not less than 32 pages, and every page enlarged, too. Just the thing to hand to your skeptic friend. Five copies or more at 5c each. Order ten, fifty, a hundred. For each copy you order, we can print one more and mail it at our own expense to some teacher. Speak up now, by post card. Speak loud enough, and we'll make it THIRTY THOUSAND.

FAKO DE KORESPONDADO

Your name and address below, two issues, 25 cents.

^aOni deziras nur leterojn; ^enur poštkartojn ilustritajn.

John Springer, Box 545, Red Cloud, Nebraska, U. S. A.

^eSro. Le Grignoux, 45, rue de l' Esperance, Paris, XIII.

^eF. J. Macalik, I. U. S., Hamovu, Hungary.

^eJ. Jenč, Havličkova 37, Prag-Zizkov, Austria.

Karl Jost, Zwinglstr. 13, Zurich III, Switzerland.

^eA. Zahel, Taborska 19, Praha II, Bohemia.

Sro. Enauld, rue du St. Esprit, Verdun, Meuse, France.

Sro. Adam, 2, rue des Rouyers, " " "